Arĝenta Filiko

ISSN 1176-418X

6-monata Bulteno de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio

Numero 25 Marto 2008

Raporto pri la Oceania Kongreso 2008

La 1a Oceania Kongreso kaj 5a kunkongreso de la Aŭstralia kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj okazis ĉe St Francis Retreat Centre, Mt Roskill, Auckland, Nov-Zelando ekde la 14-a ĝis 23-a de januaro 2008.

La kongresa programo enhavis kursojn je tri niveloj, kun internaciaj instruistoj (Trevor kaj Katja Steele el Aŭstralio, kaj Stano Marček el Slovakio, redaktoro de *Esperanto*), tri ekskursoj, jarkunsidoj de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEA), lingvaj sesioj, paroladoj pri diversaj temoj, kaj distraj aferoj.

Partoprenis 59 personoj, plejparte el Nov-Zelando kaj Aŭstralio, sed ankaŭ venis kongresanoj el Slovakio, Francio, Italio, Svedio, Francio, Malajzio, kaj ses el Nov-Kaledonio. Pro ĉi tiu nacia kaj lingva diverseco, la etoso estis vere internacia kaj oni vidis kiel Esperanto vere funkcias kiam personoj el diversaj gepatraj lingvoj sidas ĉe manĝtablo kaj interbabilas pri diversaj temoj.

Kunvenoj

Okazis diversaj formalaj kaj neformalaj kunvenoj dum la kongreso. Dave Dewar, ĉef-delegito de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) en Nov-Zelando, parolis al membroj de UEA kaj komentis pri la delegita reto. Lena Leroy el Nov-Kaledonio gvidis sesion pri

poezio. Vespere, okazis diversaj distraj kunvenoj. Oni kantis, David Ryan gvidis kvizon (kiun Trevor Steele gajnis) kaj prezentis prelegon pri ‘20 interesaj faktoj pri Nov-Zelando’. Don Rogers, scienca komisiito de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, prelegis pri programlingvoj por kom-putiloj, Katja Steele kaj Stano Marček prelegis pri Slovakio, Lena Leroy parolis pri la historio kaj aliaj aferoj pri Nov-Kaledonio, kaj Igor Couto, Prezidanto de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA), parolis pri Esperanto en Aŭstralio. Dimanĉon paralele okazis ekumena di-servo kaj filozofia diskuto dum kiu Chris Krägeloh gvidis diskuton pri la demando ĉu budhismo estas religio, filozofio aŭ psikologio.

Dum la du-sesia jarkunveno de NZEA, la Prezidanto de NZEA, David Ryan, raportis pri la agado de la Estraro dum 2007:

1. La ĉefa okupo de la Estraro dum 2007 estis la organizado de la Oceania Kongreso kaj reklamado pri ĝi. La Prezidanto dankis la Lokan Kongresan Komitaton (LKK) en Auckland pro ties laboro.

2. NZEA havas bonan financan staton dank’al diversaj investoj. Elspezoj dum la 2008a jaro verŝajne estos pli altaj ol en antaŭaj jaroj pro kongresaj kostoj kaj pli da reklama agado.

3. La Prezidanto prezentis atestilon de honora dumviva membreco al S-ino Jackie Fox pro ties laboro por NZEA, precipe pro 18-jara kontribuo kiel kasisto.

4. La Prezidanto ankaŭ dankis al Howard Gravatt pro ties kontribuo kiel helpsekretario; Howard ne plu volis esti estrarano.

5. Dum la jaro la Estraro ricevis diversajn informpetojn kaj sendis librojn kaj gazetojn al diversaj personoj kiuj interesiĝas pri Esperanto. Malgraŭ propagandado en Auckland, bedaŭrinde ne venis amaso da novaj lernantoj al la Oceania Kongreso.

6. La Estraro decidos pri la venontjara kongreso, ĉu

kongresi en Wellington aŭ ĉu okazigi jarkunvenon dum la somera kursaro kiun la Aŭstralia Esperanto-Asocio organizos en Sidnejo en januaro de 2009. Eble granda celo de NZEA dum 2008 estos reklamado pri la somera kurso kaj oferto de financa helpo al novaj lernantoj - la Estraro petos opiniojn de membroj kaj decidos pri ĉi tiu afero.

Kursoj

Dum la kongreso okazis kursoj preskaŭ ĉiutage je tri niveloj: por komencantoj, mez-nivelanoj, kaj progresintoj. La instruistoj estis Katja Steele por la komencantoj, Stano Marček por la meza nivelo, kaj Trevor Steele el Aŭstralio por la progresintoj.

Katja gvidis kurson por kvar infanoj (kiuj aĝis 5, 6 kaj 9) el du familioj (kies patroj estas Esperantistoj) kaj ankaŭ instruis aparte pli aĝan lernanton el Malajzio. La infanoj rapide lernis multajn vortojn en Esperanto. Estis precipe utile instrui al ili per kantoj ĉar poste oni povos ripeti la lernadon per ofta kantado hejme, en la aŭtomobilo ktp.

Stano instruis al meznivelanoj per sia nova libro, *Esperanto by Direct Method*. Tiu libro estas tre interesa kaj alloga por novaj Esperantistoj. AEA nun intencas uzi ĝin por sia koresponda kurso kaj NZEA ankaŭ aĉetis stokon por donaci al bibliotekoj kaj por sendi al informpetontoj.

Trevor gvidis kurson por progresintoj en kiu oni studis lian novan romanon *Kaj staros tre alte*...pri la ebla agado de Jesuo dum la periodo de lia vivo pri kiu la Sankta Biblio informas nenion. Kursanoj laŭtlegis la libron kaj diskutis gramatikajn punktojn.

Ekskursoj

Kongresanoj partoprenis en tri ekskursoj: la unua en merkredo 16a januaro estis al la montetaro Waitakere okcidente de la urbocentro kie ni vizitis al *Arataki Visitors Centre*. La dua estis tuttaga afero. Ni aŭtobuse iris norde el la urbego. La unua halto estis ĉe *Honey Centre*, t.e.

mielocentro kie oni povas informiĝi pri abeloj kaj mielo. Post tiu unuhora paŭzo la aŭtobuso iris tra la urbeto Warkworth kaj atingis al la restaŭrigita domo konstruita el betono *Wilson House*. Nun-tempe tiu malnova historia domo estas gastigejo kaj galerio. Familio Wilson entreprenis la minadon de argilo kaj kalkoŝtono kaj produkton de cemento en apuda valo kaj la nomo famiĝis en la lando. La nuna posedanto ekspozicias kaj ofertas murtapiŝojn (angle: *tapestries*) importitajn el Eŭropo. Ni manĝis sandviĉojn por lunĉo en Parry Kauri Park nur du kilometrojn for laŭ la mallarĝa kampara vojo. Bonega muzeo troviĝas tie. Promenado tra la arbaro en kiu ne malmultaj bonaj ekzemploj de kaŭrioj troviĝas tre plaĉis al niaj vizitantoj el eksterlando. *Mahurangi Regional Park* estis la venonta paŭzo. Dum du horoj oni aŭ marŝis laŭ la padoj kaj ĝuis la pejzaĝon aŭ por malstreĉiĝo restis sur la sabla strando sub la ombro de *pohutakawa* arboj. Iuj banis sin en la blua kaj klara marakvo. Post tre plaĉa tago, oni revenis iom laca al la kongresejo. Tamen, ŝajnas ke kelkaj ne tiom lacaj kon-gresanoj profitis la liberan vesperon por viziti trinkejojn en la urbcentro!

La tria ekskurso en lundo 21a januaro estis kvar-hora vizito al *Awataha Marae* en Northcote. Awataha Marae estas relative novstila urba kunvenejo kaj kultura centro. Iom post iom tie evoluas kaj disvolviĝas kunvenejo kun lernejo por infanoj, aro da dometoj por maljunuloj, biblioteko, kaj ĝardenoj. Skulptaĵoj kaj ornamaĵoj por la ĉefa kunvenejo *wharenui* estas ankoraŭ en 'frua stadio' kaj ankoraŭ nefinitaj. Ni profitis la klarigon pri la maniero por decidi la temojn por la skulptaĵoj. Anthony, la ĉefa skulptisto/instruisto tie, mon-tris al ni ĉizilojn kaj la metiistan metodon. Li klarigis pri la figuroj/homoj kiuj aperas en la lignaj artaĵoj. Li rakontis kelkajn historietojn. Maria, unu el la ĉefoj en la tiea komunumo, per vidbend-filmetoj klarigis pri la *pōwhiri*, bonveniga ceremonio,

kaj ankaŭ informis pri la kuirado de manĝoj en terforno. *Hāngi* estas la maoria vorto por tio. Ni ja ĝuis la bongustan hāngi-manĝon.

Propaganda sukceso

Ĵurnalistino de televidstacio *TVNZ* ĉeestis dum la unua tago kaj intervjuis diversajn kongresanojn. Tiun vesperon, aperis du-minuta ero en la ĉefa novaĵprogramo de TVNZ. Tiu ero estis favora pri Esperanto kaj diris ke estas nova tutmonda espero pri Esperanto. Infanoj kiuj ĉeestis la kongreson aperis en la novaĵero.

Kelkaj personoj kontribuis al tiu artikolo, specife Donald Rogers, David Ryan kaj Bradley McDonald.

Raporto de la Prezidanto

Karaj gesamideanoj

Ege sukcesa kongreso en Auckland

Estas plezuro por mi raporti pri tre sukcesa Oceania Kongreso en Auckland en januaro. Mi volas danki al la Aucklandanoj pro tre bone organizita evento, konforta kongresejo, interesplena programo, ekskursoj al ege mirindaj naturlokoj, kaj varma somera vetero. Samtempe, mi volas danki al Jackie Fox al kiu ni prezentis honoran dumvivan membrecon de NZEA pro ŝia multjara kontribuo. Plue, mi volas danki al Howard Gravatt kiu estis estrarano dum pluraj jaroj sed decidis ne prezenti sin por re-elekto.

La kongreso estis aparta sukceso por nia propaganda strebo. Mi jam ricevis plurajn telefonvokojn kaj retmesaĝojn de personoj kiuj volas scii pli pri Esperanto. Multaj el miaj amikoj kaj kunlaborantoj ankaŭ rimarkis ke ili vidis la eron en la TVNZ-novaĵprogramo. Tiel, multaj

centmiloj da nov-zelandanoj nun scias almenaŭ ke Esperanto ankoraŭ vivas en Nov-Zelando.

Kie kongresi en 2009?

La Estraro debatas nun grandan decidon pri la venontjara kongreso. La Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) okazigos someran kurson en Sidnejo ekde la 11-a ĝis la 24-a de januaro. Ŝajnas ke pli ol 100 personoj el la tuta mondo ĉeestos. Malgraŭ la sukceso de nia Oceania Kongreso, ni preferas ne organizi alian similan grandskalan eventon en Nov-Zelando, por ne konkuri kontraŭ niaj aŭstraliaj gekuzoj. Tiel, ĉu NZEA kongresu en Sidnejo venontjare aŭ ĉu ni havu malgrandskalan kongreson en Nov-Zelando, verŝajne en Wellington?

Ĉi-momente, la Estraro preferas kongresi kun AEA por helpi la aŭstralian eventon (same kiel AEA helpis nin je la Oceania Kongreso per ĉeesto de sufiĉe granda nombro da aŭstralianoj kaj per financa subtento).

Tamen, ni volas peti vian opinion pri tio. Tial, mi petas ke vi informu nin per retpoŝto (nzea@esperanto.org.nz) aŭ per telefono (0800 350 781). Vi ankaŭ povas paroli kun estrarano dum unu el viaj lokaj kunvenoj. Post ricevi opiniojn de niaj membroj, la Estraro de NZEA faros decidon.

Kion alian ni faros ĉi-jare?

Krom la kongreso, ni intencas ĉi-jare renovigi nian retpaĝon, eldoni ‘bonvenan informbroŝuron’ por personoj kiuj petas informojn pri Esperanto kaj NZEA, kaj propagandi. Okazos ŝanĝoj ankaŭ al *Esperanto sub la Suda Kruco* (ESK), nia kuna revuo kun AEA. Chris Krägeloh el Auckland estas nun unu el la du novaj kunredaktoroj kaj eble enkondukos ŝanĝojn pri la nomo, koloro,

formato, enhavo ktp. En Nov-Zelando, ni nun kunlaboros pli pri ESK (antaŭe niaj aŭstraliaj amikoj faris preskaŭ ĉion pri ESK). Ekzemple, ni devos kontribui artikolojn, kaj mi kuraĝigas vin pensi pri ideoj por artikoloj pri Nov-Zelando, Esperanto, aŭ pri iu ajn temo.

Ne forĵetu viajn librojn!

Mi ankaŭ volas peti vian helpon pri uzitaj libroj. Ni volas havi stokon da libroj por sendi al personoj kiuj kontaktas nin pri Esperanto. Povas esti lernolibroj, vortaroj, romanoj, libroj por infanoj, revuoj ktp. Se vi havas librojn, prefere ne forĵetu ilin! Bonvolu telefonvoki al mi (0800 350 781) kaj ni decidos kiamaniere vi povos sendi ilin al mi por pligrandigi la stokon de NZEA.

Mi deziras al vi ĝojplenan 2008.
David Ryan - Prezidanto de NZEA

Jackie Fox fariĝas dumviva membro de NZEA

Pro ŝia valorega laboro kiel kasistino de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEA), la estraro de NZEA unuvoĉe decidis ke Jackie Fox fariĝu dumviva membro. Post 18 jaroj da daŭraj kontribuoj, Jackie decidis eltiriĝi el tiu posteno. Lastan jaron, Jackie transdonis ĉiujn dokumentojn al Donald Rogers, la nova kasisto.

Multan dankon, Jackie!! *Supre: Jackie Fox kaj David Ryan*

Komisiitoj de la Nov-Zelanda Esperanto- Asocio por la jaro 2008

Adresaro: Donald Rogers
Arkivo: Erin McGifford
Edukado: Brian Fox
Ekzamenisto ĉefa: Brian Fox
Ekzamenisto vica: **vakas**
Fratuleco: (kunvokanto) Donald Rogers
Hejmpaĝaro ĉe TTT: Donald Rogers, Ross Moore, David Ryan
Libroservo: Donald Rogers
Servo al vizitantoj: Bradley McDonald
Peranto por gazetoj: Dave Dewar
Publikaj rilatoj: David Ryan
Redaktoro de *Arĝenta Filiko*: Christian Krägeloh
Kun-redaktoro de *Esperanto Sub la Suda Kruco*: Christian Krägeloh
Scienco: Donald Rogers
Strategia plano: la estraro
UEA ĉefdelegito: Dave Dewar
UEA observanto: Bradley McDonald
UNANZ reprezentanto: Bradley McDonald

Pri *Arĝenta Filiko*, bonvolu kontakti la redaktoron:
chris.krageloh@aut.ac.nz

Poŝtadreso de NZEA:
PO Box 8140
Symonds St, Auckland 1150, NZ

La oficiala foto de la Oceania Kongreso troviĝas en la retpaĝaro de NZEA:

www.esperanto.org.nz